

# STEFANO


211

## El la enhavo:

Kion plu en Eŭropa Unio?  
Junularo  
Laborplano  
František Omelka  
Josef Kožený  
Japanaj libroj  
Paroliga kurso  
Esperanto ne perdiĝis

2  
2004

## ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**Interesa eksperimento junulara**

*(Legu p. 40)*

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 10 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte),

### rete Starto:

malovec.starto@clavis.cz,

www.clavis.cz/starto, **rete ĈEA:**

cea.polnický@quick.cz (sekretario)

podhradska@volny.cz (prezidanto)

www.kuk.cz/cea/

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, D 500 Kč, Z 1000 Kč, Starto-abono 200 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 15200 Praha, tel. 251 817 732, m.pluharova@worldonline.cz

**Sekcioj de ĈEA:** junulara, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, pri informadiko

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia, gazetara-informa

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz

**IĈO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:**

3330 021/0100,

Komerční banka Poděbrady

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj:** 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

### **Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz (vnější a vnitřní vztahy, čestní členové)

**Vicprezidanto (ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio):** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 222 780 677 (zápisy, koncepce, metodika)

**Vicprezidanto (komitatano A de UEA):** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 20†, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinar. vztahy, UEA, vydavatelská činnost)

**Sekretario:** Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz (sekretariát, členská základna, účetnictví)

**Kasisto:** Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha, tel. 220 879 386 (konference, sjezd)

**Komitatano:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, 461 532 257, dvorakovalibuse@quick.cz, dvorakova.libuse@khspsc.cz (kluby a kroužky)

**Komitatano:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (sekce, komise)

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Prezidanto: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vakpce.cz, tel. 466 401 942;

Věra Šlahařová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., slaharova.v@kr-ustecky.cz; Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@komercpoj.cz

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz, malovec.starto@clavis.cz

**Kontrollegis:** L. Dvořáková, P. Polnický, V. Kočvara, M. Pastrňák

**Gazetara-informa komisiono:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek

## Kion plu en Eŭropa Unio?



La unuan de majo 2004 eniris en Eŭropan Union 10 novaj ŝtatoj inkluzive de Ĉeĥio kaj 9 novaj oficialaj lingvoj, en kiujn oni devis traduki leĝaron de EU (83 mil paĝojn). Kvankam ĉiuj civitanoj rajtas komunki kun la organoj de EU en sia gepatra lingvo, du el la lingvoj estas pli egalaj ol la ceteraj, nome la angla kaj la franca (la Bruselaj instancoj favoras la anglajn kaj francajn denaskulojn kiel oficistojn, do okazas certa diskriminacio). Ĉeĥa Televido ekzamenis niajn parlamentanojn pri la du lingvoj, nur 7 personoj sciis bone, la scion de la germana, hispana aŭ itala oni ne kalkulis. Sed estas demando, ĉu la oficiala subteno estos pli forta ol la naturo - nome la germanan parolas 90 milionoj da eŭropaj denaskuloj, la francan 70, la anglan 59, la italan 57, la hispanan 40. La germana estas do la plej forta, kaj la itala kun la hispana estas kompareblaj, post kelkaj jardekoj la situacio povas ŝanĝiĝi.

Nian solvon - Esperanton - la Eŭropa Parlamento rifuzas. Dum aprila voĉdonado en Strasburgo la radikala parlamentano proponis, ke Esperanto estu almenaŭ studata kiel unu el la

eblaj solvoj, sed la voĉdonantoj malakceptis la proponon asertante, ke Esperanto ne havas kulturon. Pozitive estas, ke oni unuafoje devis trakti la temon kaj ke oni atentigis, ke nia movado devas pli okulfrape elstarigisian kulturon. Kaj oni povas supozi, ke novaj problemoj kaj nur 25-procenta sukceso en lernado de la angla povas future gravigi ankaŭ la rolon de Esperanto.

En la maja numero de revuo *Esperanto* la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio *Seán Ó Riain* kaj prezidanto de UEA *Renato Corsetti* skribas en la komuna ĉefartikolo: „*Unu afero, tamen, ŝajnas ne-dubeble vera: se la parolantoj de Esperanto ne estos multnombraj kaj loĝantaj en ĉiu unuopa vilaĝo de Eŭropo, neniu atentus Esperanton nur pro la beleco de la ideo. Do, se vi volas konkeri Bruselon, unue konkeru vian lokan lernejestron aŭ urbestron, kiu subtenu kurson ĉe vi. Ĉio cetera sekvos, ne inverse.*“

Ne estas problemoj aranĝi kursojn, problemoj estas akiri kursanojn, ĉar ankaŭ la ordinaraj civitanoj sentas la samajn antaŭjuĝojn kiel la parlamentanoj. Unue do necesas konvinki la publikon, ke Esperanto havas propran kulturon, due ke ĝi estas preparita servi kiel internacia komunikilo kaj trie ke ekzistas komunumo de seriozaj uzantoj, en kiun la novaj adeptoj povas eniri.



## Esperanta kulturo

Esperanto havas jam sufiĉe riĉan originalan beletron, sed la ekstera mondo pri ĝi ne scias, ĉar mankas nacilingvaj broŝuroj pri tiu ĉi juna literaturo. Tial la publiko kredas, ke Esperanto konsistas sole el vortaro kaj gramatiko, ke ĝi estas nura komunika kodo, sed ne vera lingvo. Tiu kredo estas grava psikologia baro kaj fonto de fortaj antaŭjuĝoj.

Niaj nacilingvaj broŝuroj kutime celas persvadi la leganton al studado de Esperanto, pro tio la literaturon ili mencias nur marĝene kiel unu el argumentoj. Ankaŭ niaj gazetaraj artikoloj propagandas la lingvon, la literaturon ili nur aludas. Rezulto estas, ke nemovadanoj rifuzas legi tiajn propagandilojn, ĉar neniu deziras esti „turnita al alia kredo“. Kiam la leganto sentas, ke la teksto volas lin kvazaŭ religie konverti, li tuj ĉesas legi.

Alia afero estas broŝuroj pri fremdlingvaj literaturoj. Tiujn la homoj legas aŭ almenaŭ trafoliumas volonte, ĉar informiĝi pri gravaj aŭtoroj kaj verkoj de fremda lingvo ne necesigas studi la lingvon mem. La leganto ne sentas sin atakata kaj trankvile legas. Se li almenaŭ trafoliumus broŝuron pri Esperanta literaturo, li estus surprizita, ke en Esperanto ekzistas tiom da verkistoj kaj tiom da verkoj. Li pro tio ankoraŭ ne komencos studi Esperanton, sed en lia animo alte leviĝos respekto al tiu lingvo, kiun li

ĝis tiam opiniis senkultura. Kresko de ĝenerala respekto al Esperanto estas grava kondiĉo por multiĝo de ĝiaj studentoj.

Bedaŭrinde tiaj nacilingvaj broŝuroj, dediĉitaj ekskluzive nur al Esperanta literaturo, preskaŭ ne ekzistas. Nia kulpo. Same grave estus sendadi al la naciaj gazetoj artikolojn pri esperantlingvaj aŭtoroj kaj verkoj. Prefere ne asertu, ke Esperanto estas bonega lingvo. Pli efike estas, kiam la leganto venas al tia konkludo mem, surbaze de priskribitaj literaturaĵoj.

Ni devas subteni klopodojn traduki la plej gravajn verkojn en naciajn lingvojn, sed aperas danĝero, ke nekvalita traduko povas malutili.

## Prepariteco de Esperanto

Por multaj hezitantaj, ĉu lerni aŭ ne lerni Esperanton, estas grava demando, kiel estas Esperanto preparita en ilia gepatra lingvo por la rolo de la internacia komunikilo. Ekzisto de lernolibro kaj poŝvortaro ne sufiĉas, tiuj donas nur bazajn sciojn. Kompreneble, neniu bezonas scii la tutan lingvon parkere, sed ĝuste pro tio estas necesaj grandaj kaj fakaj vortaroj, en kiuj oni trovos specialaĵojn, kiujn oni ne portas en la kapo. Kiam la hezitantaj vidas, ke en lia gepatra lingvo tiaj vortaroj ne ekzistas, sekve li ne povu utiligi Esperanton en sia laborfako, plej ofte li decidus lerni prefere alian lingvon.

Same grava estas ankaŭ kvanto kaj kvalito de literaturo, ĉefe la faka, kaj kiel ĝi estas alirebla por la interesatoj. En Hungario pasintjare 6 mil homoj ekzameniĝis pri Esperanto, sed ni scias, ke temas pri studentoj, kiuj volis nur facile plenumi la leĝon pri dua fremda lingvo apud la angla. Ili ne volas fariĝi movadanoj, kaj ĉar nia faka literaturo estas minimuma, ili perdas intereson pri la lingvo tuj post ekzameniĝo. Multaj esperantlingvaj libroj estas malfacile akireblaj, aŭ pro prezo aŭ simple tial, ke ili estis eldonitaj antaŭ jardekoj kaj ekzistas nur kelkaj ekzempleroj en nemultaj bibliotekoj. Neakirebla libro havas por leganto nulan valoron. Tial gravas enkomputiligado de verkoj, ilia ekspozado en la interreto kaj stokado sur kompaktaĵoj, kompreneble kun respekto de la aŭtoraj rajtoj.

### Esperanto-komunumo

Hezitado ankaŭ volas scii, ĉu ekzistas komunumo, kiu praktike uzas la lingvon por utilaj aferoj, por interŝanĝi informojn pri diversaj fakoj, koncize dirite, ĉu ĉi povos eniri la komunumon kaj la lernitan lingvon apliki. Trafoli-umado de niaj gazetoj donas impreson, ke esperantistoj diskutas pri nenio alia ol pri Esperanto mem, pri ĝia propagando kaj venkigo, pri klopodoj favorigi por Esperanto la ŝtatajn kaj interŝtatajn instancojn, sed preskaŭ ne ekzistas normalaj temoj, kiujn oni

trovas en nacilingvaj gazetoj. Esperantistoj cerbumas multe pli pri tio, kiel trudi la lingvon al aliaj personoj, ol kiel ĝin utiligu ili mem. Praktikan aplikon ili faras nur tiam, kiam ili havas spektantojn, al kiuj ili povus demonstri utilecon de Esperanto - do denove ili pensas nur pri propagando, la praktika apliko estas por ili propaganda rimedo, sed ne celo. Kiam aperas nova vortaro, ili ne demandas, kiel ĝi helpas al sciantoj de la lingvo pli bone komuniki, sed ĉu ĝi akiros novajn komencantojn?

Tio estas grava manko de nia movado, ofte riproĉata de eksteruloj: „Esperantistoj volas nur disvastigi sian lingvon, ne interkonsiliĝi pri sia profesio, ne interŝanĝi ideojn kaj informojn. Sed ĝuste pro tio Esperanto ne povas disvastiĝi, ĉar ĝi ne plenumas taskojn, kiujn la mondo bezonas.“

Celo de internacia komunikado ne estas venkigo de iu ajn lingvo, sed perado de informoj inter la homoj, precipe inter la politikistoj, ekonomoj, industriistoj, sciencistoj, teknikistoj kaj turistoj. La ĉefa tasko de iu ajn lingvo ne estas varbi novulojn, sed servi al tiuj, kiuj ĝin jam scias.

Tion ni ofte forgesas. Por ni pli gravas, ke oni parolu Esperante, ol pri kio oni parolas, sed tiel ni iras kontraŭ la naturo de komunikado. Niaj pensoj rotacias ĉirkaŭ la ideo, kiel venkigi Esperanton super la angla kaj kiel varbi multajn novulojn, sed la problemon,

kiel ebligi utilan aplikon al la finlernintoj, ni metas flanken. La varbitoj ellernas la lingvon kaj poste ne scias, kion fari per ĝi.

Esperanto ne fariĝos utila, kiam ĝin lernos multaj homoj, sed multaj homoj ĝin lernos, kiam ĝi estos utila. Kaj utila ĝi estos tiam, kiam ni en utileco vidos celon de nia movado, ne nur varban rimedon. Kiam du kuracistoj komunikos Esperante por savi vivon de paciento, ne por varbi trian kuraciston al Esperanto. Kiam ni uzos niajn librojn por legado kaj vortarojn por verkado de tekstoj, ne por impresi la publikon. Kiam la eksteruloj vidos, ke esperantistoj pli pensas pri utiligo de Esperanto ol pri ĝia propagando, kaj ke ili utiligas ĝin ĉiutage, ne nur antaŭ hazardaj spektantoj.

Nur kvarono de neanglaj Eŭropanoj kapablas komuniki angle, do por Esperanto restas sufiĉe da libera loko sub la suno. Allogaj proponoj de praktikaj servoj flanke de nia movado povas esti pli efikaj ol eventuala oficialigo flanke de Bruselo, kiu male povus esti sentata kiel trudo kaj elvoki grandan malamon kontraŭ lingvo tiamaniere trudata.

Ni devas zorgi, ke ni ne elĉerpu ĉiujn niajn fortojn por agoj kun necertaj rezultoj, kiuj dependas de nemovadanoj. Tio koncernas ne nur eŭropuniajn instancojn, kiuj estas al ni malfavoraj, sed ankaŭ normalan varbadon kaj kursojn, ĉar ankaŭ ĉiu

varbato mem decidas, ĉu li lernos kaj eltenos aŭ ne. Plie multaj post unu du jaroj forlasas la movadon. Ni rezervu sufiĉe da fortoj ankaŭ por laboroj, kies rezultoj dependas sole de nia diligento kaj estas daŭraj, ekz. libroj, vortaroj, TTT-ejoj, diversaj turismaj servoj k.s. Kompare kun la ebloj, kiujn donas al ni komputiloj, ni faris ankoraŭ tro malmulte. Nia movado ankaŭ inklinas trompi sin mem per diversaj deklaroj kaj subskribaj kampanjoj, kiuj donas iluzion de grava laboro, anstataŭ fari ion vere utilan kaj daŭran.

Mi kredas, ke Esperanto havas en EU ankoraŭ grandajn eblojn, precipe elsube.

*Miroslav Malovec*

## Ŝtatoj de Eŭropa Unio

(loĝantaro en milionoj)

Aŭstrio (8,1)	Italio (57,6)
Belgio (10,2)	Kipro (0,8)
Britio (58,6)	Latvio (2,4)
Ĉeĥio (10,3)	Litovio (3,5)
Danlando (5,3)	Lucemburgio (0,429)
Estonio (1,4)	Malto (0,4)
Finlando (5,1)	Nederlando (15,6)
Francio (60,4)	Pollando (38,6)
Germanio (82)	Portugalio (10,8)
Grekio (10,5)	Slovakio (5,4)
Hispanio (39,4)	Slovenio (2)
Hungario (10,2)	Svedio (8,9)
Irlando (3,7)	



**89-a Universala Kongreso de Esperanto**



**24-31 julio 2004 Pekino**

La ĉijaran Universalan Kongreson bonvenigos la ĉefurbo de Ĉinio.

La kongresa temo:

**Lingva egaleco en internaciaj rilatoj**

**Konferenco de ĈEA  
en Olomouc**

5.-7.11.2004

Detalojn kaj aliĝilojn alportos la venonta numero

**Universala Kongreso 2006 en Firenze (Florenco)**

La estraro de UEA akceptis la inviton de Itala E-Federacio okazigi la 91-an UK en Florenco de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006.

**21-a Internacia Festivalo en Magdeburg**

**27 dec 2004 - 3 jan 2005**

Aranĝo por familioj kaj mezaĝaj personoj. Antaŭ julio favoraj kotizoj (280 EŬR, poste 310 por persono, por infanoj proks. duonaj).

Precizajn informojn petu:

Hans-Dieter PLATZ  
Postfach 1148, DE-34303  
Niedenstein, Germanio  
[HDP@internacia-festivalo.de](mailto:HDP@internacia-festivalo.de)  
[www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de)

**Projekto de diĝita arkivo**

La Projekto de Esperanta Diĝita Arkivo, mallonge PEDA, estis lanĉita de D-ro Kobayasi Tukasa kaj la kunlaborantoj. La projekto celas enigi 'bildojn' de diversaj libroj kaj aliaj konservendaĵoj en Kompaktan Diskon, eventuale kun sono. Jam prova versio estis farata. La kontaktadreso estas D-ro Kobayasi, rete: [yfa17460@nifty.ne.jp](mailto:yfa17460@nifty.ne.jp). de Japana Esperanto-Instituto

## Eŭropa amikeco

La lastan aprilan semajnon okazis en Strasburgo seminario Eŭropa amikeco por junaj esperantistoj, kies ĉefa organizantino estis finna instruistino Carola Antskog. Partoprenis mezlernejanaj grupoj el Finnlando, Britio kaj Pollando kaj aliaj gastoj el Slovenio, Ukrainio, Rusio, Albanio kaj mi kiel unu sola ĉeĥo. La mezlernejanaj grupoj estis el gimnazioj, kie oni instruas Esperanton. Sume ĉeestis pli ol okdek gejunuloj, el kiuj ĉirkaŭ duono parolis Esperanton, la aliaj alveturis ĉefe kaŭze de alia celo. La seminario nome estis ankaŭ preparo por Euroscola, kiu estas ĉiujara evento por mezlernejanaj en la Eŭropa Parlamento. Junaj homoj el variaj landoj de Eŭropa Unio pasigas unu tagon en la parlamentejo, kie oni parolas kun la politikistoj, diskutas pri diversaj temoj en laborgrupoj, kaj poste sidante en la seĝoj de la parlamentanoj voĉdonas por la fina rezolucio pri la diskutitaj temoj. Do ĉi-jare dank' al ĉeesto de niaj grupoj, el la 400 partoprenantoj pli ol 10% de junuloj en la parlamenta salo estis esperantistoj.

*Tomáš Břicháček*

## Esperanto ĉe biero

Ekde februaro okazas en Prago speciala kurso "Esperanto ĉe biero". Ĝia celo estis oferti al altlernejaj studentoj senpagan kaj netradician eblon ellerni Esperanton. Nia malgranda junulara grupo organizis kvin vesperajn kunvenojn en variaj bierejoj, dum kiuj niaj studentoj ellernis tutan gramatikon kaj la bazan vortprovizon. Origine ni havis ses interesatojn, la finalon akiris tri. Tio estas nur duono, sed persistis la plej bonaj, kiuj nun jam parolas sufiĉe bone. Post la kvin lecionoj atendas ilin la lasta devo: trapasi la finan teston.

La sukcesa kaj agrabla biera kurso certe okazos ankaŭ aŭtune, kaj ni esperas, ke kun pli bona propagando ni havos ankoraŭ pli da studentoj ol nun.

*Jana Stávková  
Tomáš Břicháček  
organizantoj*





## Ĉina beletro en Esperanto

Baldaŭ la Ĉina Fremdlingva Eldonejo publikigos en tri volumoj (ĉ. 1800 paĝoj) unu el la plej popularaj ĉinaj klasikaj romanoj "Ĉe Akvorando" esperantigitan de akademiano Li Shijun dum 10 jaroj.

## Geedziĝo

Sabate la 6-an de marto geedziĝis en la slovaka urbo Poprad la Ĝenerala Direktoro de UEA, Trevor Steele (aŭstraliano), kaj Katarina Bodnarova (slovakino). La oficiala geedziĝa ceremonio okazis en du lingvoj: la slovaka kaj Esperanto.

Gratulojn al ili!

## Naskiĝo

Al nia komitatanino Lucie Karešová naskiĝis filo Martin (3 kg).

Ni gratulas.

## ILEI-konferenco 2004 en Slovakio

Post pristudo de diversaj eblecoj, la estraro de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj, ILEI decidis okazigi la ĉi-jaran Konferencon de ILEI en la urbo Bratislava (Slovakio) inter la 14-a kaj la 21-a de aŭgusto 2004.

## Esperanto-Muzeo Vieno

En tiu ĉi jaro Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) festas jubileon: Antaŭ 75 jaroj ĝi farighis parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Estas unika fakto, ke Nacia Biblioteko oficiale vivtenas Esperanto-muzeon kaj Esperanto-bibliotekon. Pro tiu subteno IEM fariĝis la plej granda plene funkcia biblioteko por Esperanto kaj Interlingvistiko, tute je la servo de esperantistoj kaj lingvistoj.

## Artista datumbazo!

Temas pri datumbazo de esperantistaj muzikaj artistoj kaj grupoj. Aldone al tio estas informoj pri tio, kiel okazigi koncertojn, spektaklojn kaj similajn aferojn. Ideale ĝi povas helpi aktivulojn, kiuj organizos ekz. koncertojn dum Esperanto-aranĝoj aŭ en lokaj kluboj. Ĝi povos ankaŭ utili al Esperanto-bandoj por munti turneon.

<http://artista.ikso.net/db/datumbazo.php>

**Lernu superis 6000!**  
"lernu!", plurlingva paĝaro por informiĝi kaj lerni Esperanton, pli kaj pli kreskas kaj pliboniĝas. Jam pli ol 6000 personoj registris sin ĉe la paĝaro.

.....  
**Nova-malnova ĝenerala direktoro eklaboris**

Osmo Buller nun revenis al la Centra Oficejo kaj eklaboris kiel la Ĝenerala Direktoro de UEA kun kvinjara kontrakto. Laŭ li la situacio en la oficejo nun estas pli stabila ol antaŭ unu jaro, sed ankoraŭ multo lamas, li diras en ekskluziva intervjuo al Libera Folio.

.....  
**Tradukisto en la reto**

La redakcio de nia islanda tradukrevuo, La Tradukisto, nun renovigis iomete nian hejmpaĝon kaj i.a. aldonis al ĝi specimenojn de tradukaĵoj kiuj antaŭe aperis en la revuo. Nun jam estas eldonitaj 46 numeroj de La Tradukisto kun ampleksaj tradukoj el la islanda lingvo en Esperanton. Plej malmultaj de tiuj tradukoj estas alireblaj escepte en la revuo mem. Tial ni volas instigi literaturamantojn ek-

aboni la Tradukiston, se ili interesiĝas pri islanda literaturo. Ankaŭ ni volas atentigi ilin pri la hejmpaĝo de la Tradukisto <http://www.latrdukisto.tk/>. En ĝi oni povas i.a. legi pri celo de la eldono kaj ankaŭ vidi, kiuj tradukoj jam estas aperintaj en la revuo.

*Kristján Eiríksson*

.....  
**Librovendejo kun Esperanto-fako**

Ekde aprilo, 2004 en Kaunas funkcias nova librovendejo "Septynios vienatves" en centro de la urbo (str. S. Daukanto 11). Laŭ iniciato de la librovendejo en ĝi estas establita aparta sekcio de libroj en Esperanto kaj pri Esperanto. Litova Esperanto-Asocio liveris al la librovendejo porkomence pli ol 40 titolojn da tiaspecaj libroj. Estas jam la dua librovendejo en Kaunas, kiu havas apartan fakon de Esperantolibroj (la unua estas librovendejo "Knygu aleja" sur Laisves al. 29). En Vilnius funkcias unu librovendejo "Antakalnio peleda", kiu havas apartan fakon de E-libroj.

*Povilas Jegorovas*

Vikipedio, la reta enciklopedio, jam havas 12 550 artikolojn.

## Universitato Masaryk

Katedro de Pedagogio kaj Centro de Pedagogia Esplorado de Pedagogia Fakultato de Masaryk-Universitato en Brno organizas en la tagoj 13-a kaj 14-a de septembro 2004 konferencon *Laŭfakaj didaktikoj en instruista studado*. Celo de la konferenco: PedF MU volas per aranĝo de ĉi tiu laborkonferenco subteni disvolvon de laŭfakaj didaktikoj en fakultatoj, kiuj havas instruistajn studprogramojn. Ĉefrolas la traktadoj prefere en sekcioj laŭ unuopaj (aŭ parencaj) fakoj. Oni atendas i.a. prezentojn orientitajn je taksado de la nuntempa stato de unuopaj laŭfakaj didaktikoj, eventuale formiĝon de laborkomisionoj, kiuj kunordigus kunlaboron de katedroj kun didaktika orientiĝo. Akceptitaj konkludoj kaj rekomendoj estos disponigitaj al ĉiuj fakultatoj kun instruistaj studprogramoj kaj al Akredita komisiono.

Por pligrandigi nombron de eksterlandaj partoprenantoj mi interkonsentiĝis kun organizantoj de la konferenco eksterlande inter esperantistoj, precipe instruistoj, kaj promesis zorgi pri traduko de informoj por interesatoj kaj interpreti kontribuojn prezentitajn en Espe-

ranto. Bonvolu anonci sin je mia retadreso [vojacek\\_j@jumbo.ped.muni.cz](mailto:vojacek_j@jumbo.ped.muni.cz) kiel eble plej frue (dum majo) por ricevi necesajn informojn en Esperanto. Ĉehlingve ili troviĝas sur la paĝo <http://www.ped.muni.cz/wedu/didaktiky/>. Se vi mem komprenos kaj kapablos plenigi tian aligilon, vi povas uzi ĝin. Certe inter la sekcioj estos sekcio de lingvoinstruado kaj tie indos kontribuo pri didaktiko de E-instruado. Sed esperantistoj instruas krom Esperanto ankaŭ aliajn studobjektojn, pri kies didaktikoj kaj lokaj spertoj pri ili eblos interŝanĝi informojn. Partopreno de grupeto de E-istoj en la konferenco montros utilecon kaj uzeblecon de E-o dum fakaj traktadoj.

*Josef Vojáček*

## Seminario en Skokovy

La 19-a seminario en Skokovy okazos en novembro 2004, firman daton ni scios en septembro.

## Litomiŝlo

12. 6. 2004 – distrikta renkontiĝo en Litomyšl kun vizito de piarista gimnazio, kie nun estas Altlernejo de Restaŭrado. Komenco je 9.30 h antaŭ la busa stacidomo. Posttagmeze prelego pri Nov-Zelando, raportoj de la kluboj, tombolo.



## Eŭropo-Demokratio- Esperanto en la listo



La listo de la partioj kaj grupiĝoj, kiu mendis eblecon esprimiĝi ĉe la publikaj aŭdvidaj amasinformiloj por la balotkampanjo cele al elekto de la eŭropaj deputitoj de la 13-a de junio 2004 aperis en "Journal Officiel" (Oficiala Gazeto): J.O. n° 112 de la 14-a de majo 2004, paĝo 8577. Ili estas 18. Laŭ alfabeto ordo, Eŭropo-Demokratio-Esperanto aperas en la kvara loko. EDE havas nun listojn en ĉiuj regionoj. Ĝia retpaĝaro estas ĉe: <http://www.e-d-e.org>, kie ni legas:

Por elekto de la eŭropaj deputitoj voĉdonu la liston "Eŭropo-Demokratio-Esperanto":

- \* Por demokratio efika en Eŭropo.
- \* Por la subteno de la lingva kaj kultura diverseco.
- \* Por Eŭropo sendependa de la influo de USONO, ĝia lingvo kaj ĝia kulturo.
- \* Por Eŭropo pli energia por serĉado, monda komerco, diplomata influo.
- \* Por Eŭropo, kiu kontrolu sian teknokratian.
- \* Por la uzado de la internacia lingvo Esperanto, simpla, efika, kiu donas esprimeblon al ĉiuj civitanoj en internacia debato.
- \* Por ke Eŭropo iĝu ekzemplo por solidareco inter popoloj.
- \* Por ke Eŭropo iĝu ekzemplo por kunligo de kultura heredaĵo kaj moderneco.

## Internacilingva universitato en la koro de Eŭropo

Fine de aŭgusto estos plia okazo por festi en Komárno: Oni inaŭguros Liberan Eŭropan Universitaton Kelemantia, privatan institucion, kiu komence konsistos el kvar fakultatoj. La universitato aktive okupiĝos pri internacia kaj interkultura komunikado; ĝiaj precipaj instrulingvoj estos Esperanto kaj la germana. AIS San-Marino estos grava portanto de la nova institucio, kaj la rektora tripo konsistos el la AIS-profesoroj Eva Poláková, Helmar Frank kaj Reinhard Selten, nobelpremiulo pri ekonomiko. Mallongige la nova institucio estos konata kiel LEUKAIS. Kelemantia, pretere, estis la latina nomo de iama romia garnizono tiuloka.

Por festi la inaŭguron okazos du Someraj Universitataj Semajnoj de la 25a de aŭgusto ĝis la 8a de septembro 2004. En tiu tempo okazos kultura programo, gvidataj ekskursoj al la regiono kaj la proksimaj eŭropaj ĉefurboj, lingvokursoj kaj kerne la scienca programo de SUS 27, la ĉi-jara Sanmarineca Universitata Sesio de AIS. Laŭ la jamaj aliĝoj SUS 27 estos unu el la plej grandaj aranĝoj de AIS ĝis nun. Pro la riĉa kadra programo ĝi estos interesa ne nur por sciencistoj kaj science interesataj homoj. AIS invitas ĉeesti tiun eventon kaj konatiĝi kun bela regiono en la koro de Eŭropo. Pliaj informoj estas troveblaj en la retpaĝoj de AIS

[www.ais-sanmarino.org/aranĝoj/sus/sus27](http://www.ais-sanmarino.org/aranĝoj/sus/sus27)

*Reinhard Fössmeier*

## Směrnice pro hospodaření klubů, kroužků a sekcí Českého esperantského svazu

### A. Kluby a sekce ČES s právní subjektivitou

1. **Platí pro kluby a sekce**, které jsou organizační jednotkou Českého esperantského svazu (ČES), tj. vznikají dle Stanov ČES a řídí se jejich ustanoveními.

2. Pro vznik právní subjektivity organizační jednotka:

2.1. Na ustavující schůzi, která rozhodne o právní subjektivitě, zvolí výbor a revizory účtů ve smyslu Stanov ČES.

2.2. Požádá výbor ČES o vystavení registračního listu. V žádosti uvede název organizační jednotky, adresu sídla a jména a adresy tří členů výboru (zpravidla předsedy, jednatele a pokladníka). Registrační list a úředně ověřenou kopii Stanov ČES předloží příslušné divizi Českého statistického úřadu k evidenci a přidělení IČO. Na základě IČO pak požádá o registraci příslušný Finanční úřad, který organizační jednotce přidělí DIČ.

2.3. Může si (po splnění bodů 2.1 a 2.2) zřídit účet u některého peněžního ústavu, nebo může mít své prostředky (po dohodě s tajemníkem ČES) na kontě ČES.

3. V případě, že organizační jednotka s právní subjektivitou nemá vyšší příjmy než 6 milionů Kč za rok, vede v roce 2004 jednoduché účetnictví podle předpisů, platných k 31. 12. 2003 pro vedení jednoduchého účetnictví. Od 1. 1. 2005 vede zjednodušený rozsah účetnictví podle § 13a novely č. 437/03 Sb. zákona č. 563/91 Sb. o účetnictví. Peněžní deník musí obsahovat minimálně:

a/ přehled o peněžních prostředcích v hotovosti a o ceninách v členění na příjem a výdaj

b/ přehled o peněžních prostředcích na bankovním účtě v členění na příjem a výdaj

c/ přehled o příjmech a výdajích podléhajících dani z příjmu

d/ přehled o příjmech a výdajích nepodléhajících dani z příjmu

e/ přehled o příjmech a výdajích na průběžných položkách.

**Kniha pohledávek a závazků** je určena ke sledování pohledávek a závazků vůči jiným subjektům, např. k evidenci dlužníků za splněné dodávky, věřitelů za jejich splněné dodávky, poskytnutých a přijatých záloh, výdeje cenin členům a pod.

Peněžní deník a kniha pohledávek musí mít očíslované stránky a musí být vedeny přehledně a správně podle platných předpisů o účetnictví.

Kontrolu hospodaření organizační jednotky provádějí revizoři účtů a na vyžádání i dozorčí rada svazu.

Organizační jednotka podává ve stanoveném termínu přiznání k dani z příjmu za uplynulý rok. Daňové přiznání nepodává, pokud vykazuje pouze příjmy, které nejsou předmětem daně nebo mají pouze příjmy od daně osvobozené a příjmy, z nichž se daň vybírá srážkou podle zvláštní sazby.

Ke dni účetní uzávěrky provádějí organizační jednotky inventarizaci majetku a závazků.

4. Organizační jednotky ČES mohou vykonávat vedlejší hospodářskou činnost při dodržení platných zákonů ČR.

### **B. Kroužky a sekce bez právní subjektivity**

1. Platí pro kroužky a sekce bez právní subjektivity, které jsou organizačními jednotkami ČES. Pro jejich hospodaření platí tyto hlavní zásady:

1.1. Veškerý hmotný majetek a finanční prostředky se v termínu stanoveném výborem ČES stávají majetkem svazu, se kterým hospodáří kroužek nebo sekce v souladu s platnými předpisy.

1.2. Peněžní prostředky jim vede na zvláštním podúčtu Český esperantský svaz. Toto se týká i peněžní částky, která kroužkům přísluší jako podíl ze svazových členských příspěvků.

1.3. Kroužky a sekce bez právní subjektivity mohou na úhradu své činnosti dostat předem stanovenou zálohu. Záloha se zúčtuje vždy k poslednímu dni příslušného čtvrtletí tajemníkovi svazu.

1.4. Pohyb svěřených peněžních prostředků (příjmy a výdaje) vedou kroužky a sekce v pokladní knize s jednou kopií. Kopie se předkládá společně s příjmovými a výdajovými doklady vždy k poslednímu dni příslušného čtvrtletí tajemníkovi svazu. V případě vyšší hotovosti výbor doporučuje její složení na účet svazu.

1.5. Pro činnost těchto organizačních jednotek platí Stanovy ČES.

1.6. Kontrolu hospodaření a činnosti provádí revizoři kroužků a sekcí a také dozorčí rada ČES.

**C. Kroužky bez právní subjektivity, které nejsou organizačními jednotkami ČES,** t.j. působí jako organizační jednotky v rámci jiných občanských sdružení nebo škol, podniků apod., se v hospodářských záležitostech musí řídit směrnicemi, pokyny a požadavky těchto svěřizovatelů.

Dohled nad hospodařením těchto klubů přísluší dozorčím orgánům zřizovatele.

**POZNÁMKA:** Členové těchto kroužků, pokud jsou členy ČES, musí dodržovat Stanovy ČES v těch bodech a rozsahu, které se vztahují na jednotlivé členy svazu.

**UPOZORNĚNÍ:** Tyto kroužky se mohou stát přispívajícím členem svazu jako právnická osoba. To platí i pro samostatné kluby a sekce, které mají vlastní stanovy.



D. Je-li v určitém místě méně členů než pět, takže nemohou vytvořit klub nebo kroužek, mohou společně vyvíjet esperantskou činnost jako **skupina individuálních členů svazu** podle Občanského zákoníku. Vztahy mezi sebou v tom případě upraví dohodou o plné moci (paragrafy 22 a následující OZ). Dohoda podle závažnosti vztahů může být písemná nebo ústní. Jen k právním úkonům, ke kterým je předepsána písemná forma, musí být dohoda písemná. Navenek však nemohou vystupovat jako organizační jednotka ČES, nýbrž pouze jako jednotlivé fyzické osoby, resp. individuální členové svazu.

To platí i pro zdanění eventuálních zdanitelných příjmů.

Tato směrnice vstupuje v platnost dnem 1.7.2004.

Věra Podhradská v.r.  
předseda ČES

## Fondaĵo Afriko de UEA

eldonis kelkajn broŝurojn de afrikaj aŭtoroj:

**La unuan fojon.** Kompilado de verkaĵoj de togolandaj esperantistoj pri unuafoja sperto. 40p. 21cm. 4,20 EŬR.

**La instruado.** Adebayo Ola Afolaranmi. Bildoj el la vivo de niĝeria instruisto. 53p. 21 cm. 4,80 EŬR.

**De vilaĝo al ĉefurbo.** Gbeglo Koffi. Malfacila vojo de kampara knabo al urba socio kaj kleroj. 32p. 21cm. 3,60 EŬR.

**Nenio estas plu kiel antaŭe.** G.P. Bilong Bilong. Desegnitaj scenoj el la ĉiutaga vivo de nuntempa Afriko. 40p. 21cm. 3,90 EŬR.

**Togolando fabelas.** Togolandaj fabeloj rerakontitaj de "fabela grupo". 54p. 21cm. 6,00 EŬR.

**La koko kantas.** Willy Kokouvi. Facila, freŝa rakonto pri unua amo de junulo en Togolando. 24p. 21cm. 3,00 EŬR.

**Kaj kio poste?** Gbeglo Koffi. Aventuroj de du afrikaj etuloj. 16p. 21cm. 2,40 EŬR.

**La Centra Oficejo de UEA en vortoj.** Gbeglo Koffi. Kvazaŭpromeno tra la CO de UEA, kun priskribo de ties ĉambroj kaj ĉiutaga laboro. 46p. 21cm. 4,80 EŬR.

## Por ke lingvo estu intertriba, ne sufiĉas nomi ĝin tia, oni devas ankaŭ instrui ĝin!

En la mondo, kaj en Afriko, oni multe parolas pri tribismo kaj pri la malbonaj sekvoj de tribismo, kiuj interalie estas malpaco, streĉitaj rilatoj kaj eĉ malferma milito. Ni provas helpi afrikajn landojn, en la kadro de samcelaj klopodoj de Unesko, venki tribismon.

Nia rimedo ŝajnas tre bona por permesi rektan interkontraktadon inter anoj de malsamaj gentoj en la koro de Afriko, kie militoj faris multajn viktimojn lastatempe. Nia projekto estas "Lingvo de paco - Ururimi rw'Amahoro". Temas pri kampanjo, kiu celas kunligi esperantistojn el la malsamaj militantaj gentoj de Burundio, Ruando kaj Orienta Kongo (la tiel nomata regiono de la grandaj lagoj), kiuj instruas Esperanton al siaj samgentanoj por organizi post unu aŭ du jaroj grandan intertriban, interesnan, kaj interlandan renkontiĝon de esperantistoj en Bujumburo, Burundio.

Instruado de Esperanto jam okazas surloke. Nun aperis instruistino preta vojaĝi tien, ne sen personaj riskoj, ĉefe por instrui Esperanton pli bone al la instruistoj. Ni devas NUR pagi la flug-bileton kaj la ceterajn kunligitajn kostojn. Ni estas la Fondaĵo Espero, konto 'Lingvo de Paco' ĉe UEA, kiun vi jam multe subtenis en la pasinteco. Ni esperas, ke vi faros tion ankaŭ nun por ebligi ĉi tiun agadon.

*Renato Corsetti*



## Labor-plano de UEA

Ni premisas, ke organizaj strukturoj utilas, nur se ili plenumas difinitajn celojn. Ili ne estas valoro en si mem. Sekve la necesaj organizaj plifortigoj estu ĉiam konsiderataj en la kadro de la atingo de la celoj de ĉi tiu plano. Gravas la sekvaj principoj:

\* **Demokratiigo** de la vivo de UEA kun pli da respekto por ĉiuj agantoj je ĉiu nivelo.

\* **Partoprenigo** de komitatanoj de UEA kaj de aliaj funkciuloj en la decidoj kaj en la plenumo.

\* Esenca **refortigo** de la rolo de la Komitato de UEA kaj de la ceteraj gvidorganoj.

### Financaj rimedoj

UEA starigos oficon por sekvi kaj utiligi financeblojn el la fontoj de internaciaj kaj neregistaraj organizoj kaj fondaĵoj, kiuj subvencias projektojn kun celoj kongruaj aŭ parencaj al la celoj de UEA kaj kunlaborantaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj ricevu helpon por realigi siajn projekto-prezentojn.

La asocio anticipe taksu por ĉiu jaro la sumon da disponeblaj rimedoj (el spezo-konto, donacoj kaj rentoj el kapitalo). La asocio dediĉu kaj anticipe buĝetu minimumon de kvin procentoj el tiu sumo ĉiujare al novaj agadoj en ĉiu el la tri ĉefaj agad-kampoj proklamitaj en ĉi tiu plano. La dezirata investo-nivelo (kondiĉe je taŭgaj projektoj kaj plenumantoj) por ĉiu el la tri ĉefkampoj estas dek procentoj.

### Informado

\* Daŭrigo de la Strategia Forumo de la Esperanto-Komunumo kun la celo kunlaborigi ĉiujn organizaĵojn reprezentantajn la Esperanto-komunumon.

\* Okazigo de la kampanjo "Por pli vasta komunumo" por varbi kaj grandigi la membrarojn de UEA, Fakaj Asocioj kaj Landaj Asocioj.

\* Okazigo de specifaj agadoj en ĉiu mondoparto por firmigi la movadon tie. Depende de la stato de la movado povos temi pri inform-kampanjoj, kunvenoj, stabiligo de administraj unuoj por la Esperanto-movado en tiu mondo-parto.

\* UEA produktu ĝisdatajn profesi-nivelajn informmaterialojn pri Esperanto kaj ĝia movado - kiujn oni povus utiligi por produkti proprajn nacilingvajn informilojn kaj transdoni al ĵurnalistoj, lingvistoj, simplaj interesiĝantoj... - kaj prizorgu ilian disvastigon por internaciaj kaj landnivelaĵoj.

\* La Estraro de UEA donu apartan atenton al la materialo ekzistanta por informi lingvistojn kaj ĵurnalistojn.

\* UEA, kunlabore kun apartaj komisiitoj, starigu aŭ/kaj aktivigu informan fakon por la ekstera publiko.

\* UEA transiru de pasiva informado (nur al petantoj) al aktiva informado en akceptemaj internaciaj medioj. UEA subtenu, iniciatu kaj okazigu aranĝojn, kiuj montras la praktikan uzeblecon kaj utilecon de Esperanto (ekz. la projektojn "Indiĝenaj Dialogoj", "Interkulturo") kaj disvastigu informojn pri ili laŭ ĉiuj eblaj kanaloj.



\* La Estraro de UEA instigu landajn Esperanto-organizaĵojn krei sciencajn societojn, institutojn aŭ alispecajn instituciojn por povi pli profesie kaj kompetente starigi kontaktojn kaj kunlaboron kun sciencaj partneroj.

\* La Estraro de UEA instigu landajn Esperanto-organizaĵojn starigi kontaktojn kun siaj registaroj kaj tute aparte kun la landaj instancoj, kiuj tenas ligojn kun internaciaj organizaĵoj.

\* UEA daŭrigu la Koalicion de NROj por Internacia Helplingvo kun la celo mobilizi neregistarajn organizaĵojn ĉe UN por disvastigi la ideon kaj eblecon de internacia helplingvo. Samtempe ĝi intensigu siajn rilatojn kun Unesko, cele al komunaj agadoj je nacia kaj internacia niveloj.

\* UEA instigu al daŭrigo de informaj agadoj al eŭropaj instancoj.

\* UEA zorgu pri rilatoj kun la Supera Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj kun la celo atentigi pri la lingva dimensio de homaj rajtoj kaj pri Esperanto kiel taŭga solvo.

### **Instruado**

\* La asocio daŭrigu la kunlaboron kun ILEI kaj kun ĉiuj aliaj esperantistoj kaj instancoj por la plenumo de sia instruada agado.

\* Komputil-retaj kursoj kaj servoj ricevu emfazon; estu premioj kaj financado por aparte bonaj hejmpaĝoj kaj retaj projektoj akcelantaj la lernadon kaj paroligon de la lingvo. Oni aparte atentu en ĉi tiu periodo al trovado de lernantoj kaj lernhelpantoj en la retaj kursoj kaj pri kompletigo de la kursoj por enirigi la lernintojn en la Esperanto-komunumon.

\* Aparte oni klopodu pluevoluigi la ekzistantajn centrojn por instruado pri Esperanto kaj igi ilin kunlabori inter si ankaŭ por oferti siajn servojn al neesperantistoj dezirantaj lerni Esperanton.

\* La Estraro de UEA, kunlabore kun ILEI, akcelu la produktadon de lerniloj por la landoj/lingvoj, kie ili mankas.

\* La Estraro de UEA signife intensigu sian apogon al la projekto **Interkulturo** de UEA kaj ILEI per konkrete difinataj rimedoj.

\* UEA kaj ILEI starigu programon de instruista trejnado, kiel esencan elementon de la nove starigata komuna ekzamena branĉo "Instrukapablo", klopodante enkadrigi elementojn de tiu trejnado en la strukturojn de oficialaj edukaj instancoj.

### **Utiligado**

\* La Estraro de UEA instigu la bone funkciantajn fakajn Esperanto-organizaĵojn starigi kontaktojn kun internaciaj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri sama aŭ apuda temo.

\* UEA aranĝu agadojn en regionoj, en kiuj ekzistas etna/nacia streĉo por pruvi la pac-potencialon de Esperanto kaj aparte apogu tiajn projektojn kiel Indigenaj Dialogoj.

\* La rolo instrua/kuntena/aktiva de la revuo de UEA estu atentata.

\* Ni trovu solvojn por maksimumigi la eblecojn de esperantistoj en la entreprena kampo: por Esperanto per Esperanto.

\* UEA havu klaran kaj deklaran politikon pri la faka apliko de Esperanto.

*Renato Corsetti*

## Přírůstky od Japana Esperanto-Librokooperativo

(březen 2004)

2. Učebnice a mluvnice esperanta, případně jiných plánových jazyků

2.522	Benczik, V.:	Studoj pri la Esperanta Literaturo	1980
-------	--------------	------------------------------------	------

3. Odborné knihy a prospekty v esperantu ze všech vědních oborů, knihy o esperantu a plánových jazycích, interlingvistika

Skupina a číslo:	Autor:	Název:	Rok vydání:
3.537	Tacumi, Hiroši:	Gimnastiko por cerbo	1986
3.538	Ĵirkov, L.:	Kial venkis Esperanto?	1974
3.539	Honda, Katuiti:	Vilaĝoj en batalkampoj	1970

### 5. Krásná literatura, próza i poezie

Skupina a číslo:	Autor:	Název:	Rok vydání:
5.501	Odagiri, Hideo – Miyamoto, Masao – Konisi, Gaku:	Postmilita Japana Antologio	1988
5.502	Wilde, Oskar:	Salome. Dramo en unu akto	1973
5.503	Miyamoto, Masao:	Skiza historio de la Utao	1979
5.504	Konisi, Gaku:	Kantoj karmemoraj	1985
5.505	Miyazawa, Kenzi:	Nokto de la Galaksia Fervojo	1994
5.506	Konisi, Gaku:	Vago tra la dimensioj	1976
5.507	Miyamoto, Masao:	Japanaj Vintraj Fabeloj	1989
5.508	Eroŝenko, V.:	Stranga kato	1983
5.509	Eroŝenko, V.:	La tundro ĝemas	1980
5.510	Eroŝenko, V.:	Lumo kaj Ombro	1979
5.511	Eroŝenko, V.:	Malvasta kaĝo	1981
5.512	Konisi, Gaku – Miyazaki, Sizuo:	Notoj pri la Delto	1992
5.513	Kobayasi, Takizi:	La 15-a marto 1928	1987
5.514	Kinosita, Zyunzi:	Vespera Gruo	1982
5.515	Kurosima, Denzi:	Siberio en neĝo	1982
5.516	Miyazawa, Kenzi:	Gooŝ la Ĉelisto	1991
5.517	Kyôdô, Eigasya:	Mil papergruoj	1959
5.518	Miyamoto, Masao:	Legolibro: de sezono al sezono (Aŭtuno kaj Vintro)	1977
5.519	Miyamoto, Masao:	Sarkasme kaj entuziasme	1979
5.520	Miyamoto, Masao – Ueyama, Masao:	Japana Variacio	1978

Similan donacon ricevis ankaŭ la biblioteko de EK Brno. Ambaŭ bibliotekoj kore dankas.

## Paroliga kurso

Vere sukcesa paroliga kurso.

Pedagogia komisiono aranĝas ĉiujare paroligajn kursojn por pliperfektigi kaj ripetigi konversacion en nia lingvo. Por organizi la 8-an ĝi eluzis inviton kaj eblecon organizi la paroligan kurson en Ostrava Vítkovice, kie la loka klubo havas je dispono du ĉambrojn. La kurso okazis la 26-an - 28-an de marto. Entute partoprenis 15 personoj plejparte el regiono Ostrava, kiuj en du grupoj 14 instruhoroj dediĉis unue ripetigramatikon kaj poste ĉefe al riĉa konversacio. Komence tremo post kelkaj momentoj malaperis kaj sekvis interesaj paroladoj pri diversaj travivaĵoj, pri hobiaj, pri nia movado ktp. Regis bonega, familia etoso, oferemaj samideaninoj hejme preparis diversajn farunaĵojn, eĉ vespere oni babilis kaj ludis komunajn ludojn. Ĉiuj estis konviktaj, ke ie supre kontente rigardas Drahomír kaj estas feliĉa, ke

paroliga kurso okazis en lia "hejma" klubo.

Fine estas necese danki al lokaj gesamideanoj, kiuj la restadon zorgeme preparis, kaj al kursistoj, kiuj plene dediĉis sin al lingvoscio.

*Jana Melichárková  
Věra Podhradská*

## Eŭropa seminario per Esperanto

Okaze de plilarĝigo de EU, Slovenia Esperanto-Ligo organizis seminarion, kiun partoprenis kvardeko da esperantistoj el Aŭstrio, Bosnio kaj Hercegovino, Germanio, Hungario, Italio, Kroatio kaj Slovenio. Celo de la seminario estis pli bone ekkoni la agadon de unuopaj E-organizoj kaj plifortigi la kunlaboron. Laboro ĉefe baziĝis sur la laborgrupoj. Al la partoprenantoj estis prezentita ankaŭ la Programo "Junularo" de la Eŭropa komisiono kaj eblecoj kandidatiĝi ankaŭ E-programojn. Dum internacia vespero ĉiu nacia grupo havis taskon prezenti alian landon.

*Kroata Esperantista Unuiĝo*



## Aŭskultu la Esperantajn elsendojn el Pekino

Proksimiĝas la 89-a Universala Kongreso en Pekino. Fine de julio renkontiĝos tie geesperantistoj el la tuta mondo por ĝui la samideanan etoson kaj por konatiĝi kun la naturaj kaj historiaj vidindaĵoj de la bela ĉina lando.

Sed ne ĉiu esperantisto povas vojaĝi al Pekino. Tamen la antaŭkongresajn preparojn kaj la kongreson mem povos mense partopreni eĉ tiu, kiu en Pekinon ne veturos. Tion ebligas al ni la Ĉina Radio Internacia, kiu ĉiutage elsendas unuoran programon en la Internacia Lingvo. Bonŝance la elsendoj estas sufiĉe kontentige aŭdeblaj ankaŭ en nia lando. Provu do ankaŭ vi kapti la esperantlingvajn programojn el Pekino kaj tiamaniere informiĝi pri la preparoj de la Universala Kongreso.

Ĉiu elsendo enhavas novaĵojn kaj komentariojn sub titolo "Kurantaj aferoj". Poste sekvas aliaj programeroj, kaj nome lunde "Leterkesto" konversacio kun aŭskultantoj, marde "Vojaĝo en Ĉinio" pri turismaj vidindaĵoj de la kongresa lando, merkrede "Ĉina Kulturo", ĵaŭde "Ekonomia Panoramo", vendrede "Socia Vivo", sabate "Esperanto en Marŝo" - 40-minuta programero kun informoj, intervjuoj kaj raportaĵoj pri la ĉina kaj tutmonda movado, kaj dimanĉe "Mozaikα Dimanĉo" ofte kun literaturaj programeroj.

La esperantlingvaj elsendoj el Pekino estas ĉe ni aŭdeblaj dum la vintra periodo de la 20.30 h ĝis la 21.30 h per frekvencoj

9720 kHz kaj 7265 kHz (t. e. 30,86 m kaj 41,29 m), sed somere, t.e. post la 21-a de marto ili estos aŭdeblaj de la 21.30 h ĝis la 22,30 h verŝajne per frekvencoj 9880 kHz kaj 11810 kHz (t. e. 30,36 m kaj 25,40 m), la elsendoj estas aŭdeblaj ankaŭ interrete: <http://esperanto.cri.com.cn>. Provu aŭskulti la elsendojn, eble vi ne sukcesos tuj, sed se vi estos paciencaj, vi trovos la programojn aŭskultindaj. Kaj poste skribu al la radiostacio, ke vi aŭdis la elsendon. La adreso: Ĉina Radio Internacia, CRI-36, Esperanto-redakcio, Poŝtkesto 4216, Pekino, 100040, Ĉina. Aŭ uzu la retadreson: [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn). Vi povos ricevi senpage koloran informilon "Mikrofone", kiun la Esperanto-redakcio aperigas kvaronjare.

La 19-an de decembro 2004 pasos 40 jaroj ekde la komenco de la Esperanto-elsendoj de Ĉina Radio Internacia. Tiuokaze la redakcio atendas artikolojn (rakontojn, poemojn, eĉ fotojn de aŭskultantoj sub la titolo "Mi kaj Esperanta elsendo de Ĉina Radio Internacia." Ĝis la 15-a de junio 2004. Estos atribuitaj valoraj premioj al aŭtoroj de la plej bonaj artikoloj kaj krome ĉiu partoprenanto ricevos belan memoraĵon.

Aŭskultu do la Esperanto-elsendojn el Pekino kaj skribu tien. Kaj bone ĝuu la senperajn raportaĵojn pri la Universala Kongreso inter la 24-a kaj 31-a de julio 2004.

Jiří Patera



## Cent jaroj de

### FRANTIŠEK OMELKA (1904 - 1960)

Inter originalajn Esperanto-aŭtorojn enviciĝis en 1937 ankaŭ la ĉeĥa verkisto František Omelka per sia rakonto **Aventuroj de Antonio**, aperinta ĉe Eldonejo de malkaraj libroj en Brno. En 1952 The Esperanto Publishing Company Ltd. en Rickmansworth eldonis en unu volumo du aliajn rakontojn de tiu aŭtoro, **La Alaska Stafeto kaj Kaptitoj de Glacirokoj**. En manuskripto restis lia plej ampleksa romano **La Granda Admiralo**, kiu espereble baldaŭ aperos en la reta *eLibrejo*.

#### Biografio

František Omelka naskiĝis antaŭ 100 jaroj, la 19-an de aŭgusto 1904 en Staré Město apud Uherské Hradiště, en la orienta parto de Ĉeĥio (Moravio), najbara al Slovakio. Kun tiu regiono estas ligita lia tuta vivo de instruisto kaj verkisto. Lia patro poŝtisto havis multnombrian familion kun nesufiĉo da financaj rimedoj, tamen la tuta familio modestiĝis por ebligi al la talenta František (Francisko) studi ĉe la klasika gimnazio en Uherské Hradiště. Jam tie pruviĝis liaj literaturaj kaj lingvaj kapabloj, litigitaj kun lia sopiro vojaĝi tra la mondo kaj ekkoni ekzotikajn landojn. Sed la financa situacio devigis lin rezigni pri la sopiro kaj fariĝi post la abiturienta ekzameno leterportisto.



En tiu tempo li konatiĝis kun junulino, kiu havis la saman nomon kiel li - Františka Omelková (1907-1997). Ŝi ĵus finis instruistan instituton en Přerov, kio inspiris lin kompletigi sian edukitecon per pedagogia ekzameno ĉe la sama lernejo kaj dediĉi sin al la edukado de infanoj. Ili geedziĝis kaj praktikis la instruistan profesion en la vilaĝoj de sia regiono: Blatnice, Blatnička, Stříbrnice, Hluk (tie naskiĝis en 1934 ilia sola filino Věra). En 1932 ili ellernis Esperanton kaj vikle korespondis kun la tuta mondo.

Samtempe ili ambaŭ verkis kaj publikigis siajn rakontojn en diversaj gazetoj. František kontribuis (ofte sub literatura nomo Rabatin) ĉefe al gazetoj por infanoj, Františka ankaŭ al virinaj gazetoj (sub nomoj Jena Omelková, O. Melková, Jiřina Břízová, Vlasta Habrová). Kiam ŝi konstatis, ke la talento de la edzo estas pli granda, ŝi rezignis pri la propra verkado kaj helpis tajpi kaj redakti liajn verkojn. Apud centoj da rakontoj F. Omelka publikigis ankaŭ multajn riportojn kaj fakajn pedagogiajn artikolojn,

plurajn tekstojn li tradukis el Esperanto aŭ inverse al Esperanto, li kunlaboris ankaŭ kun radio (pri Hus, Komenio k.a.).

En 1938 la familio transloĝiĝis al Otrokovice, kie F. Omelka fariĝis faka instruisto de burĝa lernejo. Liaj lernantoj eĉ post multaj jardekoj rememoris liajn

lecionojn de la ĉeĥa lingvo kaj de la historio, lian oratoran kaj rakontan arton. Post la milito li entuziasmiĝis - kiel multaj aliaj - pri konstruado de socialismo kaj publikigis broŝurojn pri edukado de socialisma homo (Pedagogia takto, Edukado de moralaj sentoj, Laboro de klas-instruisto k.a.), laboris kiel lernejestro en Otrokovice kaj Napajedla kaj kiel regiona metodikisto pri la ĉeĥa lingvo.

Kancero falĉis lian vivon neatendite en lia 56-a vivojaro la 23-an de junio 1960.

Tial li ne vidis, ke la amata socialismo forigis liajn verkojn el publikaj bibliotekoj (la kialon neniu scias). La edzino sukcesis ankoraŭ eldoni en 1976 lian romanon *Velký admirál* (La Granda Admiralo) en porinfana libroserio Karavana, sed ankaŭ tiu libro restis nur en deponejo de kelkaj grandaj sciencaj bibliotekoj. Nur post la reĝim-ŝanĝo en 1989 eblis pensi pri reeldonoj. En sia 90-a jaro Františka Omelková ankoraŭ preparis por reeldono sian malnovan romanon *Žena dvou mužů* (Edzino de du viroj, 1940), kiu aperis en 1997 kelkajn tagojn post ŝia morto sub titolo *A byla svatba* (Kaj estis geedziĝo), sed la verkojn de la edzo ŝi eldonigi ne sukcesis.

En la jaro 2000 estis eldonita anglalingve la rakonto de F. Omelka *The Relay* (Stafeto) kaj la urbo Otrokovice omaĝis la preskaŭ forgesitan aŭtoron per Honora Civitaneco *in memoriam*. La filino Věra Kramářová verkis bibliografion pri la verkaro de siaj gepatroj kaj prelegas pri ilia vivo. Sed por reeldoni la verkojn ŝi ne havas rimedojn. Tial František Omelka estas pli konata en

Esperantujo ol en sia hejmlando.

## Verkaro

**Supren tra la vilaĝo** (Hore dědinú, 1935) kaj **La danĝero logas** (Nebezpečí láká, 1943) estas rakontoj pri vilaĝaj knaboj en danĝeraj situacioj.

**Aventuroj de Antonio** (Tondova dobrodružství, 1934): La 15-jara Antonio Ratajský forveturas en Italion al sia onklo, sed tie li ekscias, ke la laboraj devoj forkondukis la onklon en Tunizion. La kuraĝa knabo, anstataŭ reveturi al Ĉeĥoslovakio, sekvas la onklon al Afriko, surŝipe savas la vivon de malgranda knabineto kaj sub protekto de ŝia patro travivas en Tunizio plurajn danĝerajn aventurojn, antaŭ ol li renkontiĝas kun la onklo.

**Heroo el Komňa** (Komňanský hrdina, 1938): Rakonto pri 15-jara knabo el tempo de husanoj en vilaĝo, laŭ kiu en la 17-a jarcento akceptis sian nomon Komenio (1592-1670).

**Lupoj kontraŭ Mustangoj** (Vlci proti Mustangům, 1940): Du grupoj de malriĉaj vilaĝaj knaboj dum la someraj ferioj ne povas forveturi el la vilaĝo, tial ili aranĝas por si aventuran tendumadon surborde de loka rivereto kaj per reciprokaj bataletoj.

**La Alaska Stafeto** (Štafeta): En 1938 František Omelka studis libron pri stilistiko kaj trovis tie artikolon pri heroaj viroj, kiuj en 1925 en la alaska urbo Nome savis malsanajn infanojn, kiam ili sur sledoj tirataj per hundoj alveturigis bezonatan serumon je distanco de kelkaj centoj da kilometroj. La artikolo lin forte



impresis, li volis beletre prilabori la eventon. En Jarlibro de UEA li trovis kvar adresojn el Usono kaj Kanado kaj petis informojn. Kanada studento volonte trovis por li concernajn gazetarajn artikolojn, esperantigis ilin, eĉ desegnigis mapon de la heroa vojo. Kiam furiozis la milito, eksplodigita de kolosa egoismo, F. Omelka verkis rakonton pri heroeco de viroj, volontaj riski sian vivon por helpi al nekonataj infanoj en malproksima urbo.

La libro aperis tuj post la milito sub titolo **Ŝtafeta** (1946), la aŭtoro mem ĝin esperantigis sub la titolo **La Alaska Stafeto**, sed publikigo sukcesis nur en 1951 (Internacia Revuo Esperantista) kaj 1952 (libroforme). Dume aperis traduko germana (Die Stafette, 1948), poste ankaŭ islanda (Bodhlaupid i Alaska, 1955), nederlanda (Alaska - estafette, 1961) kaj fine angla (The Relay, 2000).

Dank' al esperantistoj venis la rakonto al la alaska urbo Nome kaj la memorantoj pri la evento estis surprizitaj, kiel precize la ĉeĥa verkisto ĉion priskribis.

**Fulmoj super Beskydy** (Blesky nad Beskydami, 1947): František Omelka havis du nevojn, kiuj falis kiel partizanoj dum la milito. Omaĝe al ilia memoro li verkis romanon pri adoleskanta partizanoj, kiuj en la arbaroj de la montetaro Beskydy travivis la militon batalante kontraŭ faŝistoj kaj estante subtenataj de kuraĝaj homoj el la ĉirkaŭaj vilaĝoj.

**Kaptitoj de Glacirokoj** (1952, ĉeĥe Pomoc přijde z hor, 1948): Juna oficiro en Romo ekscias, ke lia amiko en Parizo estas erare akuzita pri ŝtatperfido, tial li tuj forflugas kiel grava atestanto. Sed la aviadilo averias en Alpoj kaj dum unu semajno sanuloj devas zorgi pri vunditoj, antaŭ ol venas helpo.

**Paŝtisteto Ali** (Pasáček Ali, 1946):

Rakonto el mezepoka Irano, kiam simpla knabo akiris amikecon de la reĝo kaj fariĝis Gardisto de la Reĝa Trezoro.

**Ĝi komenciĝis en la 3-a klaso** (Začalo to v III. A, 1953), pri lernantoj, kiuj mem komencis batali kontraŭ ŝtelkopiado kaj trompado dum la instruado.

**La Granda Admiralo** (Velký admirál, 1976): La portugala marnavigisto Fernao Magalhaes (Magellan) en la jaroj 1519-1521 entreprenis la unuan vojaĝon ĉirkaŭ la mondo. La romano estas verkita por knaboj, do per simpla, sed streĉa stilo. La unua parto priskribas la infanaĝon, adoleskon kaj junecon de la granda portugalo, la dua parto la vojaĝon mem.

**Manjo** (Maruška, 1963): rakontado pri Marie Kudeřiková (1921-1943), efektiva historia persono, kiu en sia 22-a jaro estis ekzekutita de faŝistoj pro heroa sabotado dum la milito.

Sian pedagogian testamenton vidis František Omelka en la broŝuro **Pedagogický takt** (Pedagogia takto, 1959), en kiu li priskribis siajn multjarajn spertojn, kiel trakti infanojn por ne vundi iliajn animojn, eĉ se ili faras ion malbonan (ekz. ŝteladon), kaj kiel rekonduki ilin al la ĝusta vojo.

Tuj post lia morto aperis broŝuro **Tak jsme ho znali** (Tiel ni konis lin, 1961), en kiu liaj amikoj kaj kolegoj rememoris lian vivon, verkaron kaj pedagogian agadon.

Inter ilustrintoj de liaj rakontoj estas nomoj Josef Lada, Zdeněk Burian, Jaromír Vraštil k.a.

*Miroslav Malovec*

## Esperanto en faka literaturo

La eldonejo Libri eldonis libron de juna pedagogo el Silezia Universitato PhDr. J. Knapík, Ph. D. „La februaro kaj kulturo“ (Únor a kultura, Praha 2004, 360 pĝ). En la libro la aŭtoro analizas gravajn ŝanĝojn, kiuj trafis ĉeĥan kulturon en la jaroj 1948-1950. La aŭtoro komprenas la kulturon tre komplekse kaj detale priskribas ĉiujn kulturajn agadkampojn - filmon, teatron, radioelsendojn, eldonagadon ktp. - kaj ilian subigon al sovetaj direktivoj laŭ moskvaj modeloj. En tiu kazo ĉefrolis centraj organoj ŝtataj kaj tiu de Komunista Partio, sed ilin aktive apogis ĉefaj amasorganizaĵoj - sindikatoj, Asocio de Ĉeĥoslovaka-Soveta Amikeco kaj aliaj. En la ĉapitro „Kampanjo por socialisma realismo en arto“ estas lige kun batalo kontraŭ kosmopolitismo menciita ankaŭ Esperanto-movado (pĝ. 299). Estas tie citita la VIII-a kongreso de Esperanto-Asocio de ĈSR en

Brno (junio 1950, erare indikita kiel unuiga) kaj sekva sufoko de la movado ĝis malfondigo de la asocio en la jaro 1952. La aŭtoro informis min ankaŭ pri kelkaj gravaj dokumentoj, kiujn li trovis en arkivo de la Prezidenta kancelario kaj en ŝtataj arkivoj en Praha kaj Opava.

V. Koč.

## 100 jaroj de Josef Kožený

La 16-an de aprilo 1904 naskiĝis Josef Kožený (mortis la 2-an de marto 1960), kiu en 1935 kontribuis per siaj tradukoj al Ĉeĥoslovaka Antologio (el Jan Karafiát kaj Jiří Wolker). En 1938 li formis kun S. Kamarýt kaj T. Pumpr asocian ekzamenan komisionon, kiu daŭrigis sian laboron post la milito. En 1952 li verkis skizon *Gramatiko de Esperanto*, kiu aperis stencilita, sed ludis gravan rolon. En la sama jaro la asocio estis likvidita, sed Kožený atingis, ke al la likvida anonco oni aldonis rimarkon pri aprezo de la ĝistiamaj laboroj de esperantistoj.

mm

## ESPERANTO NE PERDIĜIS



Esperanto vere ne perdiĝis inter tiel ekzotikaj lingvoj kiel estas: oroma lingvo, tibeta lingvo, mongola lingvo, slovaka lingvo (la legantoj jam eble konas mian emon humurigi), kiuj sonis fratece unu apud la aliaj. Nun estas la vico klarigi, kie ili sonis... Atentemaj legantoj jam scias, ke la poetino Věra LUDÍKOVÁ estas sincere favora al Esperanto, kvankam ŝi mem ĝin ne parolas. Same ili scias, ke deziratajn tekstojn el ŝia verkaro jam kutime tradukadas Jaroslav Mráz, eventuale Miroslav Malovec. Tion ni povis ĝui jam pasintan jaron, kiam presiĝis ŝia libro SENDU TION PLUEN I (POŠLI TO DÁL I), ĉar ĝi estis prezentita dum la foiro MONDO DE LA LIBRO (SVĚT KNIHY) en Prago. Kaj nun nia artikolo volas vin informi, ke okazis „bapto“ de nova, simile titolita libro SENDU TION PLUEN II (POŠLI TO DÁL II).

Aŭtoroj, kiuj volas sendi sian mesaĝon „pluen“ – al la mondo, al venontaj generacioj, al la universo, estas en la libro multaj. Sed nur kelkaj povis siajn pensojn kaj ideojn prezenti publike, en la muzeo Náprstek, Prago, la 5-an de ĉi aprilo. Oni nepre diru iliajn nomojn, ĉar tio estas nomoj estimindaj kaj al multaj de vi konataj. Jen:

komponisto Ilja Hurník, evangelia teologo Milan Balabán, psiĥologino Marta Foučková, pentristo Zdeněk Hajný, poeto Josef Fousek, infanpsiĥologo Zdeněk Matějček, kuracisto František Novotný, teologo Jan Schwarz (patriarĥo de la Husana eklezio) ... kaj aliaj gravaj personoj. Ili ĉiuj proklamis sian mesaĝon antaŭ la plenplena salono. Kaj ni ĉiuj aŭskultis ĝin ĝuste en la supre menciitaj lingvoj – inter kiuj estis ankaŭ Esperanto. Ĝi sonis bele en kuraĝa deklamo de s-ano Josef Vích, al kiu ni gratulis surloke kaj al kiu ni nun danku surpapere. Same ni gratulas al la poeto Čestmír Vidman, kies poemo en la libro troviĝas en sia ĉeĥa originalo kaj Esperanta traduko.

Nia oknombra esperantista grupo sentis sin kunligita kun tiu multnombra publikaro, kaj – kial tion ne diri – ankaŭ iom fiero, ke la poetino tiel favore prezentigas nian aferon. Ĉiloke oni devas diri, ke ŝi ja faras pli multe por Esperanto, ol ni mem.

Videblis, ke homoj sopiras pri simila „nutraĵo por la animo“, kaj insistis kompili la trian libron. La poetino tion promesis fari en baldaŭ venonta tempo. Ŝin kaptis la ideo de kuracisto František Novotný, kies libro DIO EN ĈIU GENO jam famiĝis. Ŝi kuraĝigas nin ĉiujn, kiu havas en sia koro aŭ en sia kapo iun „mesaĝon“ – sendi ĝin pluen!!

*En Obořiště, la 7-an de aprilo 2004*  
*Margit Turková*



## Konferenco pri la angla

Universitato Palacký en Olomouc (Ĉeĥio), organizis internacian konferencon (23.-25.4.2004) sub dusenca titolo "English is not enough" (La angla ne estas sufiĉa - Da angla ne estas sufiĉe). La konferenco celis prezenti la anglan kiel "lingua franca"-n de Eŭropo. Tiu termino estas uzata en lingvistiko por naciaj lingvoj, kiuj en certa multlingva teritorio servas kiel komunaj internaciaj komunikiloj, kvankam oni devas akcepti, ke tiu "angla" estas alia nivelo ol la literatura aŭ eĉ ĉiutaga lingvo de denaskaj angla-lingvanoj.

La konferencon partoprenis pluraj invititaj pintaj lingvistoj kaj pedagogoj de eksterlande (AT, BG, GB, HU, SK), kiuj havis la ĉefprelegojn dum la plenarkunsidoj kaj kiuj gvidis la paneldiskuton. Inter proks. 100 ceteraj aliĝintoj estis ankaŭ aliaj eksterlandanoj, ekz. de US, PL, sed plejparte ĉeĥaj instruistoj de la angla. La ĉefa celo de la konferenco estis krom la interŝanĝo de spertoj inter pedagogoj ankaŭ instigi ĉeĥajn instruistojn de la angla pli efektive instrui la lingvojn, precipe la anglan. Sed ne mankis ankaŭ la prelegoj emfazantaj la lingvan bunton de Eŭropo kaj pledantaj por la instruo ankaŭ de la ceteraj lingvoj krom la

angla (en Ĉeĥio precipe la germana).

Dum la konferenco okazis granda ekspozicio de la eldonejo Oxford press, en kiu mi trovis krom multaj lernolibroj kaj aliaj helpiloj por instrui kaj lerni la anglan ankaŭ la verkon de R. Phillipson pri angla lingva imperiismo (eldonita 8 jarojn antaŭ lia inter esperantistoj konata verko "English-Only Eŭrope?").

Aktive partoprenis ankaŭ 3 esperantistoj, bedaŭrinde neniu de ili dum la plenkunsido. Ĉar la traktoj okazis en 7 paralelaj sekcioj, la publiko do malabundis: Usona instruisto de la hispana kaj eksprezidanto de ILEI Duncan Charters el Usono en brila prelego por 11 aŭskultantoj prezentis trajtojn de lingva edukado en Usono, kie nun altiĝas intereso pri la hispana kaj male cedas la intereso pri la ceteraj lingvoj. Dum la prelego li kelkfoje (memkomprene pozitive) menciis Esperanton.

Petro Balaz (SK) prezentiĝis kiel reprezentanto de SKEJ (Slovakia Esperanto-junularo) kaj li projekciis (por bedaŭrinde nur 4 aŭskultantoj) tre bele faritan filmon pri Esperanto "Esperanto - lingua incognita", post kiu sekvis - malgraŭ malmultaj ĉeestantoj - sufiĉe vigla kaj interesa diskuto.

Petro Chrdle (CZ) en sia kontribuo prezentis al 11 ĉeestantoj precipe propedeŭtikan valoron de Esperanto por sekva lernado de etnaj lingvoj, inkluzive la anglan.

Estas interese, ke en la reta prezento de resumoj (<http://www.instep.cz/eine/english/index.html>) tiu de Chrdle enestis nur unu tagon kaj sekve ĝi estis forigita. Mi ne esploris, ĉu pro iu hazardo aŭ intence pro la monstro de utileco de Esperanto, kiu ne tro kongruis kun la celo de la konferenco. Tamen, pli gravas, ke ĝi estis prezentita, do espereble ĝi ankaŭ aperos en la prelegkolekto.

Male, dum la kongreso oni permesis al Petro Balaz pendigi tie afiŝojn pri Esperanto, kiu efektive pendis tie dum la tuta konferenco.

Dum la panela diskuto estis afiŝitaj ĉiuj demandoj, kiujn dum la konferenco la partoprenantoj metis en la difinitan skatolon. Sekve ili estis diskutataj sub taktbastono de la ĉefprelegantoj sidantaj frunte de la publiko, sed bedaŭrinde (aŭ feliĉe - ĉar ne estis tempo por profundaj argumentoj) oni transsaltis tiujn por ni plej interesajn, kiel ekzemple:  
- Se estas bezonata "lingua franca", kial ne ekuzi Esperanton? (mi enketis la ceterajn du esperantistojn,

sed estis neniu de ni tri, kiu metis ĝin tien), aŭ

- Kial la denaskaj parolantoj de la angla ne lernas uzadi la anglan kiel "lingua franca"? Tiukaze ja ili pli efike povus komuniki kun nedenskaj parolantoj.

*Petro Chrdle*

## Omaĝo al ora duopo el Brno

Antaŭ cent jaroj naskiĝis tradukanto **Josef Vondroušek** (1904-12-01) kaj muzikisto **Vilibald Scheiber** (1904-12-29)

Esperantistoj el Brno omaĝos la datrevenon per omaĝa konferenco (27.-28.11.2004) kun jena programo:

### **Sabato:**

- Renkontiĝo de sudmoraviaj esperantistoj
- Konferenco pri J. Vondroušek kaj V. Scheiber, ilia vivo kaj verko
- Koncerto de H. Halířová

### **Dimanĉo:**

- Trarigardo de la vidindaĵoj de Brno
- Seminario pri traduk-arto
- Seminario pri Esperanto kiel planlingvo

*Informoj ĉe s-ino Věra Podhradská, Poříčí 1, CZ-603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz*

## Lingvaj ludoj kaj enigmoj (17)

Solvo el la silabumoj el la antaŭa numero:

31. tri, trila, via, vila, la, lavi, vivi, TRIVIALA

32. tedo, TELEVIDO, vido, vivi, vi, do, levi

Plua kombina enigmo estas

### ANAGRAMO

Ĉe ĝi el unu vorto aŭ kelkvorta esprimo oni kreas alian novan per nova kombino de ĝiaj literoj. Oni devas uzi **ĉiujn** literojn de la vorto (esprimo) kaj nur unufoje. Oni povas aludi la solvon (precipe ĉe longaj esprimoj).

Ekzemploj:

KARA DAMO (amiko)

Solvo: kamarado

LA GANTO

Solvo: galanto

Ĉu simpla PARDONO efikas, se akra armilo vin pikas?

Solvo: ponardo

Jen areto da anagramoj por solvo:

33. DOMETO

34. RUSA KELO (amuzilo)

35. URBETO (du solvoj)

36. En urb' historion serĉante

VIENA TURISTO promenas

pro sia stil' la **altlernejo**

jen lian atenton ektenas.

## Aforismoj kaj anekdotoj

Revenas du viroj el gastejo kaj unu volas malŝlosi pordon per cigaredo. Lia kunulo atentigis lin pri tio kaj la ebriigito ektimas: "Ĉu eble mi elfumis la ŝlosilon?"

Maljuna indiĝeno estis malgaja. Oni demandis lian edzinon kaj ŝi respondis: "Li aĉetis novan bumerangon kaj nun li ne povas forĵeti la malnovan."

Ĉe tribunalo: "Akuzito, via bigamio ne estis pruvita, vi povas reveni al via edzino."

"Jes. Sed al kiu?"

Vokas edzino de pordo al la edzo: "Rapidu kun tiu lavado de kuireja vazaro, oni venis bondeziri al vi por naskiĝtago!"

Virino en vendejo: "Mi bezonas ian donacon por mia edzo, sed ĝi estu malmultekosta kaj mi povu uzi ĝin."



## Ni kondolencas

\* en Kurojedy apud Bor u Tachova forpasis s-ano **Karel Němec**

\* la 6-an de marto 2004 mortis honora membro de ĈEA **Adolf Staňura**

\* la 18-an de aprilo forpasis **Ivanka Drbohlavová** (54-jara) el Turnov

\* la 18-an de aprilo en Ostrava-Vítkovice mortis ing. **Oskar Senft**. (72 j.)

\* la 6-an de majo 2004 malvenkis sian batalon kun malsano ing. **Vladimír Němec**, aŭtoro de konversacio *Ni parolas Esperante*.

\* la 31-an de marto 2004 forpasis elstara bulgara esperantisto **Petko Petrov Arnaudov** (1931-2004), aŭtoro de E-lingvaj libroj pri matematiko

\* la hungara esperantisto **Károly Fajsz** (oĉjo Karlo), iniciatinto de unu el niaj plej riĉaj privataj bibliotekoj, forlasis nin la 3-an de februaro 2004, preskaŭ 93-jara.

\* La 2a-n de aprilo 2004 forpasis pastro **Adolf Burkhardt** (75-jara), prezidanto de KELI, ĉefkunlaboranto de Adoru, direktoro de Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen, honora membro de GEA kaj UEA

\* la 10-an de aprilo 2004 pro koraktako forpasis **Oszkár Princz**, ĉefsekretario de Hungaria Esperanto-Asocio, iama estrarano de UEA.

\* la 30-an de aprilo finbatis la koro de la 75-jara franca E-verkisto **Georges Lagrande**, konata kiel **Sergo Elgo**.

## Adolf STAŬURA

naksiĝis la 12-an de marto 1915 kaj mortis la 16-an de marto 2004. Laŭprofesie li estis komercisto. En 1933 li kunfondis E-societon Nova Vivo en Radvanice, poste verkis paroladojn por E-elsendoj en radio Ostrava. En 1959 li translokiĝis al Ostrava-Poruba kaj tie fariĝis klubestro en 1967. En 1979 li estis nomumita prezidanto de lingva komisiono, samjare translokiĝis al Havřov. Ekde 1983 li komencis laŭ deziro de redaktoro de asocia gazeto Starto verki recenzojn pri esperantaj libroj. Adolf Staňura multe okupiĝis pri esperantlingva stenografio. Al liaj hobiaj apartenis kreado de krucenigoj por diversaj gazetoj, en kiujn li klopodis enmeti E-vortojn. Lia granda amo estis scienc-fikcia literaturo, kiun li ŝatis tradukadi. Memstare aperis lia traduko de rakontoj el Josef Nesvadba **La perdita vizaĝo** (ĈEA 1974), kaj liaj tradukoj aperadis ankaŭ en scienc-fikcia libroserio Sferoj, konkrete **Afero „La vizito“** de Karel Čejka, **Dejora vojaĝo** de Jaroslav Konáš, **Verdikto en 2300** de Vladimír Páral, **La koncerto** de Hana Pechulová kaj du rakontoj de Jaroslav Veis, nome **Duplikataparato de Henderson** kaj **La renkontiĝo**. Kun Eva Seemannová kaj Oldřich Kníchal li partoprenis ankaŭ tradukadon de broŝuro pri la historio de Ĉeĥoslovakio **Meze de Eŭropo** (1980). En 1989 dum festotagoj de dudek jaroj de ĈEA en Havřov li estis nomumita Honora Membro de ĈEA.

## KALENDÁŘ 2004

- 16.-18.4. Adonido Ratíškovice  
 14.-20.4. Skokovy (AEH)  
 ■ 28.-30.5. Kongreso de Slovaka Esperanto-Federacio en Nové Mesto nad Váhom  
 12. 6. 2004 – oblastní setkání v Litomyšli  
 19. 6. 2004 – dětský esperantský den ve Svitavách.  
 17.-20.6. Plasy  
 14.-31.7. Flugkaravano al UK Pekino  
**SET Lančov**  
 4.-17.7. 1-a etapo  
 18.-31.7. 2-a etapo  
 1.-14.8. 3-a etapo  
 13.-15.8. Renkontiĝo de ekstendaranoj  
 31.7.-7.8. Kristana kongreso Bystřice pod Hostýnem  
 7.8. E-ekspozicio en Nacia Agrikultura Muzeo Valtice  
 14.-21.8. 77-a kongreso de SAT Bratislava  
 21.-28.8. Turisma renkontiĝo (Prago, Bohemia Karsto) - postkongreso de SAT  
 14.-24.8. Nekvasovy  
 24.-29.8. AEH-IKEH Pardubice  
 28.8. Esperanto-tago Pardubice  
 1.-3.10. 17-a IKF Ústí nad Labem  
 5.-7.11. Konferenco de ĈEA  
 10.-12.11. Terminologia seminario IFEF pri trafiko - Dobřichovice  
 27.-28.11. Omaĝo al ora duopo Brno  
 12.-14.11. KAEST Dobřichovice  
 27.-28.11. 100 jaroj de Vondroušek kaj Scheber Brno  
 11.12. 24-a ĉeĥa-saksa tago Ústí n. L.

## Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Komerční banky vyplníte pokladní složenku pečlivě ve všech kolonkách, tedy: *měna účtu*: Kč, č. *účtu*: 3330 021/0100, *měna hotovosti*: Kč, *částka*: kolik platíte, *jméno a příjmení*, adresa, RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně (EK Velim) do kolonky *Vklad jménem* a pošlete tajemníkovi jmenný seznam.

Pokud posíláte peníze za sebe, **zopakujte v této kolonce své jméno**. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo v inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je 0379 při platbě v hotovosti. Pokud platíte bezhotovostně ze svého účtu, je konstantní symbol 0308. Seznam čísel:

- 06940 členství ČES  
 06941 členství UEA  
 06942 předplatné Starta bez členství  
 06943 dary ČES  
 06944 zápisné do Odborné knihovny ČES.  
 50200 sekce železničářů  
 50400 komise pedagogická  
 50401 písemný kurs začátečníci  
 50402 písemný kurs pokročilí  
 50403 členství ILEI  
 50404 Paroliga kurso  
 50405 svazové zkoušky  
 50500 sekce přátel SAT  
 50600 sekce šachistů EŠLI  
 50800 sekce nevidomých LIBE  
 50900 sekce zdravotníků UMEA  
 51000 sekce křesť. esp. KELI  
 51100 sekce katol. esp. IKUE  
 70100 komise pro tisk a inf.  
 80200 ediční fond  
 80300 propagace v tisku  
 80400 fond Tilio  
 Pro jistotu napište tajemníkovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme řadu neurčených plateb, a to na různé akce, členství ČES, ale i na členství UEA.

## Jak poslat peníze do zahraničí?

Pokud chcete zaplatit knihu, předplatné časopisu, účastnický poplatek apod. do zahraničí, pošlete peníze **mezinárodní složenkou MPI**, kterou si vyžádáte na poště. Platí se v korunách, poštovné po Evropě 90 Kč (nad 7000 Kč je poštovné 115 Kč). Cizí měna se převádí podle kurzu platného v den platby.

**Periodikum Českého esperantského svazu (35. ročník)**

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
malovec.starto@clavis.cz;  
www.clavis.cz/starto**

**Členská evidence a změny adres:  
Pavel Polnický, ČES**

**Uzávěrka dalšího čísla: 15.8.2004**

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-  
Asocio (35-a jarkolekto)  
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ  
rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj  
(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
Ĉeĥio, e-mail:**

**malovec.starto@clavis.cz;  
www.clavis.cz/starto  
Presis: HRG Litomyšl**

**Redaktadfermo de la sekva numero :  
15.8.2004**

**ISSN 1212-009X**

## **Iternaciaj ekzamenoj en Slovakio**

dum la semajno 2004-08-14/21 okazos en Bratislavo Konferenco de ILEI samtempe kun la Kongreso de SAT; dum tiu tempo ILEI okazigos Internaciajn Ekzamenojn de UEA/ILEI je **elementa** kaj **meza** niveloj, do ni havos raran eblecon subiĝi tiujn ĉi ekzamenojn kaj ekposedi internacie agnoskatan dokumentoj pri sia lingvoscio.

Aliĝante ĝis la **fino de junio 2004** ĉeĥoj ĝuas **rabatitan** prezon: 290 CZK.

Vi ne havas devon esti kongresano de ajna kongreso por povi ekzameniĝi! Aliĝojn de ĉeĥoj akceptas Petro Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz).

La ekzamenoj okazos en jenaj tagoj:  
Anŭaŭtesto: dimanĉe 17.00--18.00,  
Skriba Parto: lunde 09.00--12.00,  
Parola Parto: vendrede 15.00--18.00.

**Loko:** Bratislava-Ruĝinov, Bazlernejo kaj gimnazio de Sankta Vincento de Paul, Bachova strato.

## **Svitavy**

19.6.2004 Infana Esperanto-tago en Svitavy. Ĉiuj infanaj esperantistoj estas sincere invitataj.

Komeco je 9:30 h antaŭ la trajna stacidomo.